# La Bulteneto

Numero 71 - Esperantojaro 137 Nummer 71 - Jahr 2023

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



# Ŝvebanta akvodukto mirigas turistojn en Vieno

La konstruado de la metrolinioj U2 kaj U5

# La Bulteneto

Numero 71 Esperanto-jaro 137

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
Tekstoj: Renate kaj Walter Klag
esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

La tubo devas situi pli alte ol la supra kontaktlineo de la tramo.

Fotoj sur la paĝoj 1 ĝis 7: W. Klag 2023

Fotoj sur la paĝo 8: Johannes Zinner.

# Dika tubo trastrekas Vienon

Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio, kreskas. Baldaŭ 2 milionoj da homoj vivos en Vieno. Antaŭ 40 jaroj estis nur 1,6 milionoj. Sekve ankaŭ la metroa reto devas kreski. Ĝis nun funkcias en Vieno kvin metrolinioj: U1, U2, U3, U4 kaj U6. Ĝis nun oni neniam konstruis la linion U5. „U“ signifas „Untergrund“, do „sub la tero“, kvankam la traceoj de kelkaj linioj estas parte sur aŭ super la stratnivelo. Nun oni konstruas la novan linion U5. Ĝi estos parto de la ĝisnuna linio U2 kaj kondukas sur nova traceo en la okcidenton de Vieno. U2 plilongiĝas al la sudo de Vieno.





La nova linio U5 kaj la plilongigita linio U2.
11 novaj haltejoj. Maldekstre la kruciĝo U2-U5.
(Foto W. Klag)

La konstruado de la kruciĝo de U2 kaj U5 okazas en grandega truo, en kiu amasiĝas daŭre grundakvo en la profundeco de 20 metroj. Por ebligi la konstulaborojn oni devas forpumpi tiun akvon, kiu venas el 100 putoj konstruitaj ĉirkaŭ la Urba Domo de Vieno (Rathaus).




La supro de unu el la cent putoj, norde de la Urba Domo (Rathaus) de Vieno, kiuj elpumpas grundakvon. (Foto W. Klag)

La akvo forfluas en 60 centimetrojn dika tubo, parte sep metrojn supre de la stratnivelo, de la konstruejo malantaŭ la universitato kaj la Urba Domo (Rathaus) ĝis Danuba Kanalo. La longeco de la tubo estas unu kilometro. Sur tiu tubo legiĝas multloke la nomoj de la linioj U2 kaj U5. Tra la tubo fluas maksimume 350 litroj da akvo en unu sekundo. 350 litroj estas la enhavo de unu aŭ du bankuvoj.



La tubo kaj Rathaus.




La tubo sep metrojn super la stratnivelo.



Antaŭ la tiel nomita Ringturo (Ringturm). Temas pri 20-etaĝa domo ĉe Ringstrato, kiu ĉirkaŭiras la unuan distrikton de Vieno. (Foto W. Klag)



Apud Ringturo fluas la akvo en Danuban Kanalon
kaj poste en Danubon.




Dum la konstrulaboroj la tramlinio U2Z anstataŭigas la metrolinion U2. Fotita antaŭ Ringturo.




Sur Ringstrato videblas nun la plej moderna Viena tramo. Linio 71, tipo D. Fotita sude de la haltejo Schottentor (Skota Pordego).

## U5-Aufgang Schwarzspanierstraße



**Aufnahmedatum:** 23.06.2020
**Fotograf:** www.oln.at
**Größe:** 2492 x 3744
**CopyRight:** www.oln.at / Alle Fotos auf bildstrecke.at stehen zum Download unter Einhaltung der Copyright-Angaben für redaktionelle und nicht-kommerzielle Zwecke zur Verfügung

**Bildbescheibung:**

U5-Aufgang Schwarzspanierstraße: Aufgang der neuen U5-Station Frankhplatz in der Schwarzspanierstraße

In den Warenkorb

**Stichwörter**

Ausbau | Grafik | U2xU5 | U5 | U-Bahn

←Zurück zur Übersicht

## Erste Bahnsteigtüren für U5



**Aufnahmedatum:** 11.08.2022
**Fotograf:** Johannes Zinner
**Größe:** 4034 x 4606
**CopyRight:** Johannes Zinner / Veröffentlichung honorarfrei bei Namensennung ausschließlich für redaktionelle Nutzung.Nutzung uneingeschränkt bei Namensnennung

**Bildbescheibung:**

Erste Bahnsteigtüren für die vollautomatische U5 bei der Station Volkstheater

In den Warenkorb

**Stichwörter**

Ausbau | Öffi-Ausbau | U2xU5 | U-Bahn

←Zurück zur Übersicht

Supre elirejo Schwarzspanierstraße de la haltejo Frankhplatz de U5,
sube pordoj sur la perono de U5, haltejo Volkstheater.
Tiu linio funkcios aŭtomate, do sen stiristoj.
Kopirajto de ambaŭ fotoj: Johannes Zinner.

## Ligiloj

https://www.wienerlinien.at/u2xu5

https://www.wien.gv.at/stadtentwicklung/projekte/verkehrsplanung/u-bahn/u2u5/

https://de.wikipedia.org/wiki/Linienkreuz_U2/U5

https://www.schimetta.at/de/artikel/spatenstich-fuer-die-u2u5-wien

Renate KLAG
Walter KLAG

# Bitte beachten Sie auch die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag

# LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO




Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 90 €.




50 Steloj  Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 60 €.




100 Steloj  René de Saussure, eldonita 2018, prezo 50 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al  esperanto@chello.at.




Die Münze Österreich AG

Wien 3., Am Heumarkt 1

Pregejo de la arĝentaj

100 Steloj kaj 50 Steloj

# STELO-TABELO

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 5000 | 20 € |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 5000 | 30 € |
| 10 Steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 25 Steloj | Cu-Ni 75-25 | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 | |
| 25 Steloj | Ag 900/1000 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 | 200 € |
| 25 Steloj | Au 983/1000 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 | |
| 1 Stelo | Plasto ruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 | |
| 3 Steloj | Plasto flava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 | |
| 10 Steloj | Plasto verda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 | |
| 100 Steloj | Ag 999/1000[2] | 31,1 g<br>1 unco | 37 mm | 2018[3] | 1000 | 50 € |
| 50 Steloj | Ag 925/1000 | 30,0 g | 40 mm | 2020 | 300 | 60 € |




Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.
Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.
Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.

---

[1] Pregitaj en la jaro 1960
[2] La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.
[3] Pregita en la jaro 2017

# Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko" (EN), probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum naŭ jaroj ĝis 160 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo en 45 landoj.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi"). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidos poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko"

# Esperanto en Vieno

Vizitu niajn renkontiĝojn en la hejmeca, tipe Viena kafejo AIDA

en la naŭa distrikto, Währinger Straße 47.

La aktualajn informojn vi ricevas de

esperanto@chello.at




La kafejo AIDA

Haltejo Spitalgasse de la tramlinioj 5, 33, 37, 38, 40, 41 kaj 42



# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage**
Im selben Haus befinden sich auch die
**Musikaliensammlung**
und das
**Globenmuseum**